**Esperanto en lernejo** Germanaj geknaboj kontaktas esperantistojn kadre de lerneja projekto | 83

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

# esperanto

107-a jaro • n-ro 1279 (4) » Aprilo 2014

**Dek Demandoj al László Szilvási** | 78

**Indiĝenaj geedzoj de Meksiko ne rezignas pri siaj lingvaj rajtoj** | 87

**UK en Bonaero** Ŝanco admiri ekstazigan arkitekturon, kun konstruaĵoj historie plensignifaj kaj plenaj de detaloj | 88

ISSN 0014-0635



## La horo kaj la vico de la junularo

La E-centroj bezonas freŝan sangon. La junularo emas labori por pli bona mondo. Ĉu eblas interkonsento? | 84

# "Ni devas uzi merkatikajn metodojn kaj profesinivele manaĝeri niajn projektojn"

Merkatiko, profesia laboro per Esperanto, konkretaj celoj, kompetenta manaĝerado, intensa aktivado per multflanka agado. Jen la vivo de la hungara esperantisto László Szilvási, ne sufiĉe konata modelo – tamen imitinda – de E-aktivulo.

**Fabrício Valle**

László Szilvási origine estis inĝeniero pri elektronikaj aparatoj de aviadiloj, sed ekde 1987 li okupiĝas seninterrompe pri Esperanto kiel sia ĉefa laboro, tamen ne kiel dungito de iu asocio, sed kiel gvidanto de sia propra malgranda firmao. De simpla helpanto al estrarano en diversaj organizaĵoj li trairis la etapojn de la kutima Esperanta kariero. En 1984 li fondis sian unuan entreprenon, nome Lingvo-Studio, tuj post la diplomiĝo pri civila aviado en Sovetunio. Li poste diplomiĝis ankaŭ pri ekonomiko kaj specialiĝis pri merkatiko. Ne estas vaste konate, ke li jam de pli ol 10 jaroj funkciigas propran porpagan retan kurson, kiu gvidas la lernantojn de la nula nivelo ĝis la mezgrada ekzameno B2. László Szilvási plenumas diversajn movadajn taskojn: funkciigas interretan vortaron, plurajn servojn kiel STEB – Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, Ret-Info, paĝojn en fejsbuko, zorgas pri reklamo, radio- kaj televid-intervjuoj, produktas filmojn kaj muzikajn materialojn, kaj ankaŭ partoprenas en la loka Esperanta vivo. Li posedas kaj prizorgas la retejojn *www.esperanto.hu, www.eszperanto.hu, www.eventoj.hu kaj* dekon da aliaj por la fondaĵo, asocio, lingvolernejo, entrepreno ktp. Lia persona retpaĝo ĉe *www.eszperanto.hu/szilvasi/*, kun datumoj kaj retligoj, prezentas lian kompletan profilon.



## 1

***RE: Kion oni povas diri pri la unuaj 100 jaroj de Esperanto?***

**LS:** En la unuaj cent jaroj elformiĝis la tradiciaj agadkampoj, sed por nesukceso de la diversaj projektoj (aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj, varbado ktp.) oni ĉiam povis preteksti eksteran kaŭzon, nome, ke "ni vivas diaspore, kaj la geografiaj distancoj malebligas ĉion." Tamen kelkaj projektoj estis pli sukcese manaĝeritaj, kaj ni nun rigardas ilin kiel grandiozajn iniciatojn. En la lasta jardeko pro tutmondiĝo kaj interreto la mondo iĝis malgranda, la signifo de la distancoj multe reduktiĝis, sed la E-komunumo ankoraŭ ne adaptiĝis al tio. Estas necesa tempo por transformiĝo de la movada strukturo. Kompreneble ankaŭ la kresko de naciismo en la mondo havas bremsan efikon kaj ni devis ekkonscias, ke nur uzado de la sama lingvo ja ne solvas la interpopolajn problemojn.

## 2

***RE: Kiel vi bildigus la Esperanto-movadon, kun ĝiaj mankoj kaj ĝiaj plej valoraj trajtoj?***

**LS:** Mi pensas, ke Esperanto estas varo por kiu validas la samaj merkataj leĝoj kiel por ĉiu alia varo. Tamen, oni elektas la funkciulojn de la Esperanto-movado ne laŭ manaĝeraj aŭ merkatikaj kapabloj, sed laŭ ilia lingvoscia aŭ alia socia nivelo. Ekzistas du-specaj kapitaloj: la unua estas la tradicia formo de financaj valoraĵoj. La dua speco de kapitalo estas la internacia, persona ligo-reto, kiu en la hodiaŭa mondo estas ege valora. La tradician kapitalon oni povas ricevi aŭ heredi, la personan retligaron ĉiu devas elformi. Esperanto kaj la E-movado multe simpligas tiun taskon, kaj multe plifaciligas elkonstrui tiun kontakto-reton, kies valoro estas netaksebla.

## 3

***RE: La aserto, ke Esperanto estas varo, ne facile akceptiĝos ĉe multaj esperantistoj. Kiel superi la rezistan sintenon de la esperantistaro?***

**LS:** Mi ne pensas, ke oni devus ŝanĝi la sintenon de ordinaraj esperantistoj – oni uzu la lingvon kaj havu entuziasmon! Tiu entuziasmo tamen ne signifu rifuzon de profesinivela agado, sed por sukceso la gvidantoj kaj organizantoj devas havi merkatikan vidmanieron, sed same kiel aliaj civilaj movadoj ankaŭ nia laboro devas baziĝi sur volontula agado, des pli, ke la teknologia evoluo simpligis kaj malplikostigis la tradiciajn oficejajn taskojn. Kompreneble ekzistas kelkaj taskoj, kiuj pro troa tempopostulo estas plenumeblaj nur kontraŭ financa kompenso.

## 4

***RE: Vi delonge agadas kiel profesia esperantisto; ĉu valoras la penon?***

**LS:** Mia laboro egalas al mia hobio, mi ne estas dungito, la tutan tagon mi povas okupiĝi pri Esperanto, tio vivtenas min – do plene valoris la penon. Tamen, tio ne estas simpla afero, sed mi fieras pri multaj niaj atingoj, rekordoj kaj pionireco en pluraj movadaj kampoj. Ekzemple, antaŭ la interreta epoko dum 10 jaroj ni sukcese eldonis la tiam plej oftan Esperantan novaĵgazeton Eventoj, al kiu ligiĝas pluraj rekordoj. Eble la plej interesa kaj ĝis nun nekonata estas tio, ke ĝi estis la unua E-gazeto, kiu havis regionajn represaĵojn en Pollando, Rusio kaj Litovio, kie oni presis kaj distribuis ĝin al enlandaj abonantoj – kun aldono de sia enlanda informilo. Krome, de dekkelkaj jaroj ni funkciigas E-lernejon, kiu estas verŝajne la plej granda en Esperantujo. Kaj fine, inter multaj aliaj atingoj, mi plej fieras pri tiu, ke ekde 2003 – do jam de 11 jaroj – ni funkciigas

propran, unikan, porpagan interretan kurson por hungaroj. Ne estis simple atingi, ke pli ol 4 000 homoj estu elektintaj nian pagan kurson anstataŭ la senpaga *Lernu*.

5

***RE: En Hungario por ricevi la universitatan diplomon oni devas ekzameniĝi pri iu lingvo, sed lavango da tiucelaj E-lernantoj kabeas, trapasinte la ekzamenon. Kial la E-movado apenaŭ sukcesas reteni la novbakitojn?***

**LS:** Por tiuj studentoj Esperanto estas unu el la ordinaraj studobjektoj, sed dum la kurso multaj el ili entuziasmiĝas ankaŭ pri la movada flanko. Post la ekzameno tamen forŝiriĝas la sola instruista fadeno kiu ligis ilin al Esperanto, kaj sen pliaj impulsiloj la entuziasmo estingiĝas. La fenomeno estas la sama, kiel en la tuta Esperanto-movado. Ĉiu esperantisto restas en la movado pro iuj personaj avantaĝoj: ĉu pro amika societo, ĉu pro favorkondiĉaj feriebloj, ĉu pro ĝuo de la plenumata movada pozicio ktp. En la movado restas nur tiuj personoj, kies bezonoj en tiu kampo estas kontentigataj. Se tiuj altirfortoj rompiĝas, oni simple retiriĝas el la movado. Por reteni do tiujn multajn kursanojn, oni devus zorgi pri elformado de iliaj personaj kontaktoj. Oni devus organizi serion de malgrandaj, lokaj renkontiĝoj kun cel-orientita programo, kaj flegi la kontakton kun ili por teni la entuziasmon freŝa. Bedaŭrinde la tradiciaj movadaj strukturoj ne estas pretaj plenumi tiun taskon, mankas la manaĝerado – pri kio mi aludis en la dua demando.

6

***RE: Kian rolon havas interreto en la velkiĝo de la tradiciaj movadaj strukturoj kaj ŝrumpado de la membraro de tradiciaj E-organizaĵoj kiel UEA. Ĉu interreto ne devus esti pozitiva faktoro?***

**LS:** Ĉar ni vivas ja diaspore en la mondo interreto estas tre efika helpilo por esperantistoj. Pro la tutmondiĝo kaj interreto fundamente ŝanĝiĝis la socia komunikado, la eksteraj cirkonstancoj, sed la tradiciaj Esperanto-organizaĵoj nur parolas pri tio kaj nek adaptiĝas al la novaj kondiĉoj nek komprenas, ke nova metodo de komunikado ŝanĝis la rolon de la E-organizaĵoj. Ĝis nun en la praktiko ilia ĉefa tasko estis peri la informojn pri la konkretaj ebloj de lingvouzado (diskonigo kaj varbado al renkontiĝoj, radioelsendoj, novaj literaturaĵoj, kulturaj varoj ktp). Tiujn informojn ĝis nun oni povis akiri nur pere de membreco en iu asocio. Hodiaŭ tio ne plu veras; oni povas esperantumi, akiri ĉiujn informojn kaj uzi la lingvon sen ajna membreco! Kial do oni iĝu membroj en iu E-asocio, kial do oni pagu kotizon? Interreto donas tre efikajn ilojn por priservi la jamajn parolantojn. Aliflanke eĉ nur unu aŭ kelkaj personoj povas funkciigi tutmondajn servojn, kaj ĉi-okaze ili priservas "klientojn", sed ne "membrojn".

7

***RE: Do, ĉu solvo estas, ke la E-organizaĵoj traktu siajn membrojn kiel klientojn?***

**LS:** Priservi klientojn estas tasko postulanta manaĝerajn kaj merkatikajn konojn – do multaj gvidantoj de landaj kaj lokaj asocioj ne kapablas fari tion. Kiel solvon, mi povas imagi, ke en la estonto Esperanto-organizaĵoj membrigos nur tiujn aktivulojn, kiuj volas konkrete kontribui al la disvastigo de Esperanto – kaj la aliajn Esperanto-parolantojn rolos kiel klientoj. Anstataŭ plenrajtaj (kaj voĉdondevaj) membroj, oni povus ligi la individuojn al lokaj aŭ internaciaj asocioj per "subtena membreco", aŭ "amika societo" aŭ similaĵoj, kiuj donas kaj pozitivan senton kaj la eblon por priservado (kaj peti financan kontribuadon). Laŭ mia sperto restas en la movado ĉefe tiuj personoj, kiuj havas ankaŭ personajn konatojn, do kiuj iam fizike partoprenis renkontiĝojn kaj kunvenojn, kaj elformis homajn kontaktojn. Por ili interreto tre multe helpas plu flegi tiujn kontaktojn. Aliflanke, la homoj kiuj venis al Esperanto nur per interreto, eĉ se ili estas entuziasmaj, sen vivaj personaj kontaktoj kutime post iom da tempo perdas la interesiĝon. Interreto do estas tre efika, tamen ne anstataŭas la personajn kontaktojn. Ĝi estas rimedo, sed ne la celo.

8

***RE: Kiel fakulo pri merkatiko, kiujn zorgojn vi proponus por ke iniciato sur la kampo de E-instruado estu sukcesoplena?***

**LS:** Mi pensas, ke antaŭ ĉiu projekto oni devus starigi kaj respondi la demandon, kio estas konkrete la celo, kion mi volas atingi. La necesaj metodo kaj rimedoj multe dependas de tio! Se la celo estas prepari homojn al lingvoekzameno, gravas la bonaj instruiloj. Se per la kurso ni celas havi estontajn vizitantojn de E-renkontiĝoj, ni devas koncentri nin je elformado de kluba etoso, ĉe funkciigo de reta kurso ni devas aparte flegi la personan kontaktadon, kaj tiel plu. Okazis antaŭ nelonge, ke iu E-organizaĵo decidis lanĉi novan interretan kurson. Oni elspezis milojn da eŭroj kaj milojn da laborhoroj por verkado de studmaterialo, sed dum du jaroj neniu levis la demandojn, kio estas la celo, kiuj lernos pere de tiu ĉi kurso, kial oni elektos ĝin anstataŭ la jam ekzistanta Lernu, kiu funkciigos tiun ĉi kurson, kiuj korektos la taskojn kaj kiuj estos la kondiĉoj, el kio devas konsisti la kurso, ke ĝi havu ian ŝancon resti viva. Cetere similajn demandojn oni devus respondi ĉe Esperanto-organizaĵoj, ĉe la organizado de ĉiuj Esperanto-renkontiĝoj kaj projektoj: kio estas la celo kaj konkrete kion ni volas atingi? Se ni sukcesis formuli la respondon, venas la sekva demando: kiel trovi lernantojn, kaj kio estas ilia vera motivo?

9

***RE: Ĉu utilas havi klaran ideon pri tio, kion oni konkrete volas, se estas nek homaj nek financaj rimedoj?***

**LS:** Des pli grave estas havi trafitajn celojn, ju malpli da rimedoj oni havas! Nur tiel oni povas havi realajn celojn kaj eviti la malsukcesojn. Mi ne vidas problemon en la volontula karaktero de nia agado, sed ĝi ne devas esti "mojosa", nome farita kun entuziasmo sed sen fakaj konoj, amatora, fuŝa. Ni povas agi profesinivele ankaŭ kiel volontuloj. Parton de la necesaj enspezoj povas doni la kotizoj, sed ekzistas ankaŭ pluraj aliaj kanaloj tradiciaj kiel la instruado de Eo, eldonado, organizado de aranĝoj, koncertoj ktp. Aliflanke, malantaŭ ESF kaj UEA staras sufiĉe grandaj kapitaloj, per kiuj oni povus financi diversajn projektojn. En multaj landoj oni povas akiri ŝtatajn subvenciojn, destinitajn por la civila sfero. Ekzistas subvencia sistemo de Eŭropa Unio, kiu ĵetas monon per grandaj sakoj al kulturaj-edukaj-studaj projektoj, ofte tute akordiĝantaj kun niaj Esperantaj celoj. Ekzemple, sole E@I akiris centmilojn da eŭroj el tiu fonto, gajnis per ĝi ankaŭ pluraj tradiciaj E-organizaĵoj. Tiuj monfontoj ekzistas, sed ili ne venas per si mem al ni, oni devas aparte labori por ricevi ilin. Mi povus imagi, ke la eŭropaj landaj asocioj, kaj eĉ ankaŭ UEA, nun dungos apartan personon kun la tasko verki konkursprojektojn kaj akiri monon el la kaso de EU.

10

***RE: Ĉu vi revas pri grandega sukceso de via entrepreno okaze de eventuale amasa kaj ekfurora disvastiĝo de Esperanto?***

**LS:** Bedaŭrinde mi ne vidas reala la baldaŭan amasan disvastiĝon de Esperanto. En la E-movado mi vidas nur malmultajn homojn kun manaĝeraj kapabloj, kaj tiel ni ne povas eluzi eĉ la eventualajn brilajn okazojn – kiel tion montras la ekzemplo de la hungaria amasa lernado. Estas tamen interese rimarki, ke lastatempe prosperas pluraj iniciatoj, manaĝerataj de individuoj aŭ de malgrandaj grupoj, ne ligitaj al iu ajn tradicia E-asocio, kiuj estas la ĝermoj de la nova manaĝera generacio. Mi resumu la aferon: ĉirkaŭ nia movado estas merkataj cirkonstancoj. Se ni volas sukcesigi Esperanton, disvastigi ĝin kaj popularigi ĝian uzadon, ni devas uzi merkatikajn metodojn kaj profesinivele manaĝeri niajn projektojn.